


LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO”

REDAKCIO: E. VAN VEENENDAAL-BOUWES, LIMMEN NH. NEDERLANDO • ADMINISTRACIO: T.J.O. CENTRO WESTGRAFTDIJK NH. NEDERLANDO. ĜIRONO 382363 • JARABONO 1.50 NED. GULDENO ĀU EGALVALORO

LA POSEDO DE LA MONDO (George Duhamel).

..... Okazis en la tempo, kiam en Parizo ankoraŭ estis omnibusoj kun imperialoj. Mi iris hejmen, sufiĉe malfrue. Estis unu el tiuj freŝaj kaj delikataj vesperoj, en kiuj oni super la malbonodora strat-atmosfero enspiras dolĉan kaj puran ventan ekblovon, kiu venas de málproksime. Tute sola mi pripensis aferojn, interesaj nur por mi, sed kiuj gajece plenigas la senliman spacon de la mondo.

Meze de mia revado mi sentis preskaŭ ne rimarkeblan tuŝon kontraŭ mian dekstran ŝultron. Tio ne forlogis min de miaj pensoj. Duafoje mi sentis la puŝeton, sekvata de malforta, daŭra tuŝado.

Flanke de mi sidis junulo 16—17—jara, vestita kiel metia lernanto. La malforta lumo de stratlanterno lumigis lian palan kaj lacan vizaĝon. Li ŝajnis lacega pro dormo kaj fermis la okulojn. Mi rimarkis ke lia kapo, balanciĝanta laŭ la ritmo de la veturilo fine tuŝas mian ŝultron. Per instinkta movo li tiam relevis ĝin, sed momenton poste ĝi ree kliniĝis. Mi tiom profundigis en miaj pensoj, ke la naturulo en mi sin vole nevole defendis, kaj singardete mi ŝovis la junulon al sia loko. Ne helpis, la sekvan momenton li ree glitis al mia ŝultro, kvazaŭ kun ia senkonscia bonfido. Du-, trifoje mi ankoraŭ repuŝis lin, tiam mi cedis, kaj provis kun tiu eta ŝarĝo daŭrigi mian ravan mensan vojaĝon. sed mi ne sukcesis. Stranga, neatendita, kaj nekonata percepto ekregis min. Estis brutaj, penetrantaj varmo. Tion kaŭzis la kapo, ripozanta kon-

traŭ mia ŝultro, kaj ankaŭ brako, kiu iom post iom premis sin en mian flankon. La knabo dormis profunde. Mi turnis mian vizaĝon al li, kaj sentis lian spiron kian de infano, mallonge kaj puŝe kontraŭ mian vangon kaj mentonon. De tiu momento mi ne plu pensis pri miaj gravaj personaj aferoj, mi nur zorgis ke la knabo ne vekigis.

Mi ne memoras, kiom longe daŭris tiu dormo. Estis varme al mi, stranga, dolĉa varmo; mi sentis min agrable, tute profundiĝinte. Mi penetris en nekonatan universon, same vasta, same stelriĉa kiel mia. Mi ne komprenis, ke tiu tuŝado komence povis inciti, eĉ naŭzi min. Mi disŝiris la krudan ŝelon kaj nun gustumis, kiel nutrigan frukton, la homan estecon kaj ĉeestecon.

Subite ekestis kriado kaj lumo. Ektime la knabo sin levis, frotis al si la okulojn, malfirmpaŝis al la ŝtuparo kaj malaperis; li eĉ ne vidis min.

Li neniam sciigis, kiom mi ŝuldas al li, kaj ke mi neniam forgesos lin.
Adapte, N. KOOL.

LA TERO TREMAS (El: Japanujo, kia ĝi estas).

Iom pli ol 1000 tertremojn jare oni nombras sur la japanaj insuloj, tio estas sur la relative malgranda terspaco iom pli ol kvarono de ĉiuj okazantaj tertremoj (3800).

La fremdulo, kiu unuafoje spertas tertremon kuregas en sia noktovesto al la halo de sia hotelo aŭ al la salono de sia gastiganto. La ŝtuparo ondas sub li kiel maro — aŭ ĉu estas la genuoj, kiuj rifuzas servi? Ĉiu trabo, ĉiu meblo parolas sian misteran, knarantan lingvon. Kvankam oni kuregas, kaj kaprice saltas, oni bezonas kelkajn minutojn por regi la ŝtuparon.

La japano restas plenkvieta dum tertremo. Sendube oni povas atribui la famajn fortajn nervojn de la japano al la daŭra ekzerco sekve de la tertremoj. Ĉiu familiano havas specialan taskon dum tiaj okazoj: Unu atentis, ke altvalora vazo ne falas, alia tenas la ŝrankon plena de porcelano, la patro enpoŝigas la plej gravajn dokumentojn; en la eŭrope meblitaj domoj ekstaras ankaŭ iu sub la kristala lumkrono. Nur kiam la skuoj fariĝas tiom fortaj, ke la kalko bruetas de la muro, kaj la tegmentaj kovraĵoj malfiksiĝas oni eniras la ĝardenon aŭ straton kaj ekfumas cigaredon. Neniu krias aŭ kuras pli rapide ol alia. Cetere, tio ne havus sencon, ĉar kien oni kuregas? Kiam la skuoj fariĝas tregej, kiam forta

tertremego iras trans la teron, ĉi tiu fendigās kaj englutas homojn, kaj ankaŭ kontraŭ tio ne helpas forkurado. Ekstere en la nokto oni nur aŭdas mallaŭtan, multvoĉan murmuradon de tiuj, kiuj flustre admonas al singardo, priparolas la tremegon kaj deziras, ke ĝi baldaŭ finiĝu. Nur la hundojn oni aŭdas en timego abomene bojaĉi. De temp' al tempo disfalas domo. Tio ne kaŭzas multan bruon, ĉar la japanaj domoj estas malpezaj, kaj ne falas laŭte; fakte oni aŭdas nur etan susuradon super la ĝenerala krakado. Oni rapidas al sia najbaro por helpi. Tie kaj tie ekbrulas, aŭ, kiam okazas dumtage, oni vidas grandajn polvnubojn, leviĝantaj super la disfalintaj domoj.

La skuado malfortiĝas, la hundoj bojaĉas pli laŭte. La brulsonorigilo sonoradas, la fajrobrigado rapidegas tra la stratoj. Familioj, kiuj perdis siajn domojn, iras kun sia tuta havaĵo al parencoj por ankoraŭ iom dormi. La tertremo pasis. La iom ekscitita, trankviliĝanta „He-e-e-e” de la homamasoj forsonas. Oni enlitiĝas. Finis ordinara okazaĵo.

Povus fini pli malbone, ofte ja okazas tiel. La granda tertremego en 1923a forigis preskaŭ la tutan ĉefurbon Tokio, kaj krome Yokohama, la plej gravan havenurbon. Kion ŝparis la skuoj, la avidaj flamlangoj forlekis. Rifuĝintoj, kiuj forkuris en la kamparon, englutiĝis de fluego. 99331 homoj mortis, 43476 forrestis, 103733 vundiĝis, centmiloj da domoj detruigis.

Nokto en Japanujo.

La kusenoj estas diferencaj por viro kaj virino. Amiko Tanakan uzas kusenon, plena de brano. Ĝi estas sufiĉe malmola, rulforma kuseno, proksimume 50 cm. longa. S.ino Tanakan fakte tute ne rajtas kuŝigi sian kapon, ĉar tio povus malordigi ŝian hararon. Ĉi tiu frizaĵo estas ja tre arta. Ne eblas fari ĝin sen la helpo de aliaj. Ĝi do devas resti dum tagoj, eĉ dum semajno. Tial ŝia kuseno konsistas el malgranda, lakita skatolo, 30 cm. longa, kaj 15 cm. larĝa. La supra parto estas pli mallarĝa kaj sur ĝi estas eta, maldika kuseneto. Ĝi ŝovas tiun dormskatoleton sub sian nukon, kaj pasigas tiel la nokton, dum ŝia kapo tute libere ŝvebas en la aero.

Junularo verku por via propra gazeto. Sciigu al la red. de „La Juna Vivo” kion vi plej ŝatas legi en nia revuo, kaj klopodu mem verki artikoleton pri de vi ŝatata temo. Nur tiel la gazeto povas fariĝi vere interesal

Jam nun ŝparu por la Internacia Junularkunveno.

MIA TAGLIBRO PRI LA DUA INTERNACIA JUNULAR-
KUNVENO EN BELGUJO (Tervuren, 7-14 aŭg. '39).

(La adiaŭo)

„Job Job!”

„Jes” dormeme respondas Job.

„Leviĝu jam estas la kvina horo!” estas Rein.

Tuj ekestas vivo en la tendo. Ĉiu vekiga. La lasta tago la tago de la foriro la tago de la adiaŭo.

Post kelkaj minutoj ni jam estas pretaj. Ankaŭ Jekke kaj Denice estas pretaj. Mi faras miajn pakaĵojn. Job faras la samon, ankaŭ Carlos kaj Jefke. Maŝine mi ĉion faras. Mia cerbo preskaŭ estas detruita.

Jen estas Tineke. Mi rigardas ŝin — ŝi rigardas min sed nenion mi diras. Eĉ ne „Bonan matenon.” Mi ne scias, ĉu ŝi rimarkis tion. Se jes, mi petas, pardonu min kaj komprenu, ke mi faris ĝin nesciante. Job kaj mi malkonstruas la tendojn. Post nia laboro ni rimarkas nur flavajn rektangulojn en la herbo: Ĉi tie staris nia tendo tie la „preĝejo” (la plej granda tendo). For estas ĉio. Ni ligas la valizojn de Job sur la portilon de lia biciklo. Pretaj ni estas. La aliaj jam estas for. Nun al la salono. Jam staras la grandaj aŭtobusoj antaŭ la pordego. Mi metas miajn pakaĵojn ĉe s.ro Noë. Mi serĉas la aliajn. Tuj ni estas kune. Mi rimarkas al Tini, ke ŝi denove surmetis alian veston.

„Estas por la vojaĝo. Mi surhavis la saman kiam mi venis al Tervuren.” — Tini volas aĉeti fruktojn. la butikoj ankoraŭ ne malfermiĝis.

La angloj unue foriras. Jam ronkas la motoro. Jackie, la malgranda anglo, premas la manon al ĉiu. „Hulloh Chap! Shake hands, shake hands!” li nur krias, krias, incitas. Jen estas nia angla dancisto. Tuj ni kuras al li kaj tiam Denice rakontas al li, kial li estas kara al ni, ke ĉiuvespere ŝi kun Jekke vidis lin danci en kalsono! Li ridas kaj ruĝiĝas kompreneble. Sed afable li diras: „Ĝis revido!” la aŭtobusoj moviĝas Krioj ŝvebas en la aero, kaj super ili la voĉo de Jackie Brakoj svingas „Ĝis revido!” Malgraŭ tio ke mi ne multe konatiĝis kun la angloj, nun, kiam ili forveturas, mi scias, ke karaj amikoj estas for Denove mi sentas min malforta. Jekke staras apud mi. Ŝi ploras. Job alvenas. „Venu, ni manĝos.” Tute ne eblas al mi engluti manĝaĵojn. Ankaŭ Carlos ne manĝas. — Nun la butikoj estas mal-

fermita. Ni tuj aĉetas vinberojn kaj prunojn. Kaj estas la oka horo kaj duono: La holanda karavano ankaŭ pretigas sin Ni havas tempon por fari foton Ho tiun foton mi ne preparolu La frisa karavano foriras. „Adiaŭ, Rein, Jekke, Jopie, ĝis revido!” Sur la vizaĝo de Rein mi rimarkas esprimon, kiun mi ne komprenas ... Ĉu estas rido aŭ ne. Li nur diras mallaŭte: „Ĝis revido, Roger.” Junulo ankoraŭ faras foton de ni, Jan Kat, Henk, Carlos kaj mi. — Kaj nun Jobke foriras. Pierre akompanos lin ĝis Antwerpen. Ni akompanas Job kaj Pierre ĝis la angulo de la strato. Ne eblas al iu diri vorton. „Ĝis ... ĝis re ...” Jobke nerve prenas sian biciklon for li estas. — Denove kara amiko foriras. De nia tuta rondo nur restis Denice, Tini, Jefke, Carlos kaj mi. Nun la lasta karavano foriras. „De Stormvogels”. Sinjoro Schut, ĉiam laborema homo, filmas la forveturontojn. Tini jam sidas en la aŭtobuso Ŝi sidas antaŭ la fenestro. Surprizo (mi ne scias ĉu ĝi estis surprizo por Tini), sed s.ro Schut kiu ekvidas Tini ĉe la fenestro, filmas ankaŭ ŝin. Belega rememoro! Mi adiaŭas Nelie, Nell, Rika, Lena, Jan Kat, Henk, s.ron Schut, s.inon v. Veenendaal, Jenneke, s.ron v. d. Horst, Floor, Bets Wit, Klaaske, ktp. Mi nur aŭdas: „Ĝis revido.”

Kara ĝi sonas al mi. Motoroj ronkas. Estas la naŭa. — Lasta manpremo lasta vorto lasta rigardo brakoj ŝvingas karaj voĉoj vokas malheliĝas miaj okuloj

ROGER COSYNS (Belgujo).

VIZITO ĈE S-INO WANDA ZAMENHOF.

Malgranda vilao en la fino de la ĉefurbo, sed kiam mi eniras estas videblaj la signoj de milito: difektaj muroj, senvitraj fenestroj. De sia kuracista kabineto renkontas min s-ino Zamenhof.

„Mi havas al vi peton” ŝi komencas, „bonvolu korekti vian informon rilate la sorton de miaj bofratinoj, Lidia kaj Zofia. Mi havas nenian sciigon pri ilia sorto post ilia forveturo el la ghetto, sed mi firme kredas, ke ili vivas. Mi kun mia filo mirakle saviĝis dank’ al helpo de kuracistoj, kiuj havis la rajton eniri la ghetton. Entute la poloj, loĝintaj post la muroj de la ghetto multe helpis al ni dum kaj post la forlaso de tiu malliberejo. Ni havis multajn signojn de simpatio flanke de alilandaj esperantistoj, precipe svedaj, kiuj per la sveda ambasadorejo en Varsovio eĉ provis savi nin en 1940a, kaj poste sendis al ni mangaĵpakajojn, same kiel dir. Jakob el Genevo kaj samideanoj el Portugalujo. Bonvolu saluti la samideanaron de la tuta mondo,” finas s.ino Zamenhof.

EL BULT. ESP. POLLANDA.



Funebro.

Pere de nia sveda amiko Justo Boberg ni sciigis, ke la germanoj mortigis Ludmila Jevsejeva (Riga, Latvujo). En ŝi ni perdas fideelan amikininon. Ĉar kvankam juna, ŝi estis la pioniro de nia juna movado en sia lando. Ludmila mortis, sed ŝiaj poemoj restis, kaj ili eterne atestos pri la simpla, granda homamo de la verkintino!

La suban poemeton „Junularo, formu rondon” ŝi verkis je 17-jara aĝo:

Junularo, formu rondon!

Junularo, formu rondon!
Gloru sonu kanto
Al ideo Zamenhofa,
Lingvo Esperanto!
Junularo, formu rondon!
Firme harmonian;
Kun devizo en la koro:
„Amu lingvon nian!”
Junularo, formu rondon!
Hor’ decida venos.
Pro laboro tiel bela
Vin Estonto benos.

Ludm. Jevsejeva.

Al junaj esperantistoj.

Infanoj karaj, nur kun vi
Sincere mi paroli povas.
En via klara okulpar’
Malsana kor’ printempon trovas.
Amikoj junaj, nur al vi
La Estonteco apartenas.
Per manoj fortaj venkos vi
La barojn, kiuj nin katenas.
Vin kronos mondo per radi’
De la kvinpinta stelo,
Vin, kavalira avangard’
Vin, militontaj por la Belo!

Ludm. Jevsejeva.

Estas alta, solena, preskaŭ terura penso por ĉiu homo, ke lia tera influo havas komencon, sed neniam, tra ĉiuj jarcentoj, ĝi havos finon. Kio okazis, tio ja okazis, ĝi jam kunfandiĝis kun la senlima, eterne vivanta, eterne moviĝanta universo kaj influos ĉu al bono, ĉu al malbono, ĉu kaŝe, ĉu malkaŝe, dum ĉiu tempo.

Carlyle.

Tiu, kiu eldiras tion kio vere vivas en li, trovos homojn kiuj lin aŭskultos, kiom ajn grandaj la baroj!

Carlyle.

ESPERANTISTA VESPERO EN LISBONO.

Je la 16a de decembro, 1945a oni festis en la blindula lernejo la 86-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof.

Post longjara silentado, tiu okazintaĵo estis vera ĝojkaŭzo kaj la entuziasmo vibris en la animo de la lisbonaj samideanoj.

Ĉirkaŭ la 16a horo komenciĝis la festo, per la ludo de nia himno de blindula kvarteto, kion la tuta ĉeestantaro starante aŭskultis.

Sekve la konataj esp. propagandistoj Saldanha Carreira kaj Luzo Bemal-do parolis nelonge pri la vivo kaj verko de nia Majstro. Tiam Alsácia Fontes Machado parolis pri la bonkoreco kaj grandanimeco de Zamenhof kaj deklamis parton el la bela poemo „Preĝo sub la Verda Standardo”, de ŝi tradukita en la portugalan lingvon. Maria Manuela Lopes finigis la unuan parton, rakontante kelkajn spritajn anekdotojn.

La dua parto de la vespero konsistis el kantado de konataj amatoroj kaj radio-artistoj.

La trian parton prizorgis blinduloj. Ili pianludis, kantis, kaj deklamis. Precipe la delikata blinda poetino Emilia Montalvo prezentis belajn kantojn kaj deklamojn, de ŝi verkitaj. Sekvis la blinda samideano Antonio Pereira, kiu parolis pri la dia deveno de Esperanto.

La kunveno finiĝis nur nokte, per alvoko al „La Paco”, legata de Emilia Montalvo, dum du etaj blindulinoj aperigis la verdan standardon, post kio grupo da esperantistoj, kelkaj blindaj, kiuj akompanis la legantaron sur la scenejo, vibre kantis nian himnon, tuj akompanata de ĉiuj esperantistoj en la salono.

Estis vere bela, varma esperantista vespero, kiu neforgesebla restos en la memoro de ĉiuj ĉeestantoj.

ALCACIA FONTES MACHADO, Lisbono (Port).

LINGVOSCIO KAJ PROBLEMOJ TRAFIKAJ.

Sub tiu ĉi titolo aperis sciigo en la nederlanda gazeto „De Waarheid” („La Vero”) de la sekvonta enhavo:

„En la lastaj monatoj la privata aŭtomobiltrafiko estas pli limigita.” — „En la suda parto de nia lando oni povas aĉeti petrolon ekster la distribuo ĉe la pordo.”

Du faktoj! Kaj tamen estas rilato inter ili, ĉar benzino, bezonata por aŭtomobilveturi, estas tradukata angle per „petrol”, kaj kiam oni miendis benzinon el Ameriko anstataŭ el Kanado aŭ Anglujo, „oni” petis „petrol”, post kio la amerikanoj kompreneble sendis petrolon, ĉar benzino estas „gasoline” en Ameriko. — Kaj do: Malpli da aŭtomobiloj veturas kaj ni disponas pri multe da petrolo.

Ĉu ni bezonas pli klaran ateston por la neceso de simpla, internacia helplingvo, per kiu ĉiu miskompreno estas evitata? Ni ĉiuj scias, ke Esperanto estas la solvo. (Mi respondis al la gazeto, kiun respondo oni ne enpresigis. Tamen la redaktoro petis informojn, laŭ kiuj li verkos artikolon pri Esperanto).

H. Uittenbogaard.

LUIZA.



Mia nomo estas Luiza; mi estas hispan-*in-o*. Mi estas la frat-*in-o* de Felipo, de Pablo, de Anita, de Ramono kaj de Gracia. En nia familio estas ses infanoj: tri knaboj kaj tri knab-*in-oj*. Mi laboras en la domo: mi balaas, mi frotas, mi kuiras, mi lavas, mi gladas kaj mi zorgas pri la litoj.

Nia patr-*in-o* kudras por la sinjor-*in-oj* en la urbo. Je vendredo ŝi iras kun Pablo al Las Palmas. Je sabato — en la posttagmezo — ili revenas. Mi zorgas pri la infanoj. Mi laboras en la ĝardeno: mi zorgas pri la legomoj, pri la plantoj, pri la floroj. Mi zorgas pri la bestoj: pri la koko kaj dek kok-*in-oj*, pri la kunikloj, pri la kapr-*in-o*, pri la hundo kaj la kato kaj pri Blekemul.

Anita kaj ŝia amik-*in-o* Maria helpas.


Anita! jen estas du banaoj: unu por vi kaj unu por via amik-*in-o!*

		<i>o</i>				<i>in</i>
banan-o		la lit-o	hund-o		hund- <i>in-o</i>	
la famili-o		plant-o	kat-o		kat- <i>in-o</i>	
flor-o		vendred-o	kok-o		kok- <i>in-o</i>	
la ĝarden-o			kapr-o		kapr- <i>in-o</i>	
infan-o			hispan-o		hispan- <i>in-o</i>	
kunikl-o			sinjor-o		sinjor- <i>in-o</i>	
<i>as</i>						
mi bala-as	ili help-as	mi lav-as	jen	ŝi	dek	
mi frot-as	mi kuir-as		por	ŝia	ses	
mi glad-as	ŝi kudr-as	mi zorg-as	pri		tri	

Ekzerco: Enmetu „la” aŭ „ĝi”: ... infano kuŝas en ... lito; ... dormas. ... hundo estas en ... ĝardeno; ... iras al ... knab-*in-o*. ... mulo estas en ... stalo; ... manĝas. ... kato iras al ... domo; ... trinkas. ... kuniklo sidas en ... stalo; ... iras al ... mulo.

Gramatika enhavo:

la persona pronomo: ŝi; la prepozicioj: por, pri
la poseda pronomo: ŝia; ripetado: in; la — ĝi.
la verbo: as;



Kiu estas la knabo sur la dorso de Blekemul? Li estas Ramono.

Kiu estas la knab-in-o sur la mulo? Ŝi estas Gracia.

Kiuj estas la du knaboj apud la mulo? Ili estas Felipe kaj Pablo.

Kiuj estas la du knab-in-oj apud la kaktoj? Ili estas Luiza kaj Anita.

Gracia kaj Ramono sidas sur la mulo. La ŝnuro estas ĉirkaŭ la buŝo de la besto; la fino de la ŝnuro estas ĉirkaŭ la pulso de Felipe.

Blekemul iras al la vilaĝo. Felipe kondukas, Pablo sekvas. La du infanoj sur la dorso de la mulo ridas kaj adiaŭas. Ankaŭ Luiza kaj Anita adiaŭas.

Apud la domo de la najbaro, sinjoro Delmonto, la mulo kaj la kvar infanoj haltas. La najbar-in-o, ŝia filo Joseo kaj ŝia fil-in-o Maria salutas. Joseo iras kun la infanoj al la vilaĝo. Jen la mulo kaj la kvin infanoj iras tra la stratoj de la vilaĝo. La homoj ridas kaj salutas. Gracia kaj Ramono ridas kaj salutas. Ili estas princo kaj princino, ĉar ili rajdas sur mulo. Ili ĝuas de la rajdo.

o

la fil-o

la lakt-o

la najbar-in-o

la princ-in-o

la fil-in-o

la najbar-o

la princ-o

la rajd-o

as

ili adiaŭ-as

li konduk-as

ili rid-as

apud

kvar

kiu

ili ĝu-as

ili rajd-as

ili salut-as

tra

kvin

kiuj

li sek-vas

ās

mi manĝas

trinkas

ĝuas

loĝas

kuŝas

naĝas

vi

”

”

”

”

”

”

li

”

”

”

”

”

”

ŝi

”

”

”

”

”

”

ĝi

”

”

”

”

”

”

ni

”

”

”

”

”

”

ili

”

”

”

”

”

”

Ekzerco: Respondu al jenaj demandoj: Kiu vi estas? Ĉu vi estas knabo? Ĉu vi estas knab-in-o? Ĉu vi loĝas en vilaĝo? Ĉu vi loĝas en urbo? Ĉu vi naĝas en la maro? Ĉu vi iras al la kino? Ĉu vi rajdas sur mulo? Ĉu vi iras kun via patro al la farmoj? Kiu estas via najbaro? Kiuj estas viaj amikoj? Kiuj estas viaj amikin-oj?

Gramatika enhavo:

Ciuj personaj pronomoj; La prepozicioj: apud — tra;
La estanta tempo de la verbo as; la korelativo: kiu(j);

Korekto: Sur paĝo 35 de No 98, elfalis la frazo „Ĉu vi ankaŭ laboras kun via patro?” — El la vortlisto elfalis: vi — via. Sur paĝo 36 devas stari: „La leono kuŝas sur la sablo” (anstataŭ sur la roko). Noto: „siesto” estas ripoza tempo post la tagmanĝo.

LA NOVANOJ.

Verkita de Annie Rebers. Ilustrita de Toon Langeberg.

Por ne-profesiaj geinstruantoj, kiuj ŝatas tion, sekvas ĉi sube kelkaj indikoj:

1. Antaŭ ol vi instruas, bone tralegu la gramatikan enhavon de la pritraktota leciono. Vi trovos ĝin sub la lecionoj. Bone pristudu la tie menciitan teorion en via propra lernolibro.
2. Antaŭ ol instrui la novan lecionon, ĉiam komencu pritrakti la fari-tajn erarojn en la antaŭaj tradukaĵoj.
3. Pritraktu la novan teorion. Donu unue la ekzemplojn el la leciono kaj — se necese — pliajn ekzemplojn, kiujn vi mem kolektis el via lernolibro. Donu ĉiam, kiam tio estas ebla malgrandan teorio-regulon, kiun la lernantoj notu en siaj kajeroj.
4. Laŭtleĝu malrapide la lecionon (vidu ankaŭ sub 8); tre bone atentu vian elparolon. Ripetu speciale la sonojn, kiuj ne troviĝas en via lingvo.
5. La legantoj laŭtleĝu parton de la leciono; tre bone atentu ilian elparolon.
6. La lernantoj traduku la lecionon: ili ja lernis la novajn vortojn dum la pasinta semajno (vidu 8).
7. Multfoje daktu al la lernantoj kelkajn frazojn, por ke la orelo kutimiĝu la sonojn.
8. Laŭtleĝu la vortojn de la sekvonta leciono kaj donu la tradikon. La lernantoj lernu tiujn vortojn parkere antaŭ la sekvonta instruado.
9. Donu hejmtaskon: t.e. 1e, parto de la esperanto-leciono por traduki nacilingven; 2e la speciala(j) esperanta(j) ekzerco(j), kies celon vi antaŭe klarigu al la lernantoj; vi ankaŭ povas pritrakti ilin dum la kurso kaj post tio la lernantoj faru ilin hejme; 3e kiam vi povas: faru ekzercon en la nacia lingvo por traduki esperantlingven.

Ĉar montriĝas, ke — malgraŭ ĉia penado — restas kelkaj eraretoj en tiaj verketoj, la verkintino afable petas la kunlaboron de la geinstruantoj, ke ĉi tiuj komuniku tiajn erarojn al ŝi.

„LA MALGRANDA PERFIDULO“.

Dum la kvinjara protektado de la germanoj nia popolo suferis multe, ne nur spirite, sed ankaŭ korpe. Iom post iom oni forprenis ĉiun komforton. En la lasta tempo ni eĉ ne plu havis elektran lumon. Do tiu, kiu ne disponis pri ia lumigo devis enlitiĝi samtempe kun la kokoj. Sed estis kelkaj nederlandanoj, kiuj tamen havis lumon, ĉar ili kaŝe uzis de la elektra fluo, destinita nur por la germanoj Ankaŭ ni faris tion. Kaj nun mi rakontos veran travivaĵon.

Foje mi tre zorge purigis la ĉambrom, kaj ĉar mi tre malŝatas polvon, mi uzis la elektran polvosuĉilon. Jus mi finis la purigadon (la senpolvigilo staris ankoraŭ sur la planko, malantaŭ la tablo) kiam germano suriris la vojeton al nia domo. Anstataŭ iri al la ĉefpordo, li iris rekte al la ĝardenpordoj de nia ĉambro. Kion fari?! Mi ekstaris antaŭ la sojlo kaj klopodis plilarĝigi min. La germano ĝentile ekparolis. Li babilis pri la malbonaj militaj cirkonstancoj kaj jam antaŭdiris, ke venos granda malsato en Nederlando, ktp. Subite li ekparolis pri la elektro, kaj demandis:

„Ĉu vi ankoraŭ havas petrolon por lumigi?“

Mi respondis: „Nur unu litron.“

Li kompate skuis la kapon. „Ĉu vi eble havas kandelojn?“

Mi diris: „Nur tri!“ (tio estis vera). Sed — subite mia malgranda fileto Rudolf ekfunkciigis la polvosuĉilon. Neniam antaŭe li faris tion, li ja estis apenaŭ 1½ jara knabeto!

„Kio???“ diris la germano, „Ne elektro, kaj tamen elektro! Mi ne komprenas, sinjorino!“

Mi sentis, ke mi paliĝas (kiomfoje mia edzo jam avertis min pro mia senpolvigado), sed respondi mi ne povis. Tiam la germano afable ridis: „Mi komprenas la aferon, s.ino, ne timu. Mi ne perfidos vin, sed estonte atentu pli bone, ĉar povus esti ke alia germano venus ĉi tien, kiu estas fervora Hitlerano, tiam vi morgaŭ sidus en koncentrejo.“ Multe li parolis, sed mi saĝe silentis, ĉar oni ja ne tuj povis fidi la germanojn. Sed feliĉe mi ne spertis malfacilaĵojn. Kaj poste pli sekrete uzis mian senpolvigilon!

FEMMIE BAKKER—KROON, Bergen (NH).

La Kialo.

Instruisto: „Ĉu vi scias, Roberto, kial la maro neniam superakviĝas?“

La knabo: „Kredeble ĉar multaj spongoj estas sur ĝia fundo!“

Senutile.

A.: „Ĉu estas vere, ke via hundo perdiĝis?“

B.: „Jes, tre bedaŭrinde.“

A.: „Publikigu do anoncon pri ĝi en la ĵurnaloj.“

B.: „Malsaĝulo, mia hundo ja ne povas legi!“

El „Svisa Espero“.

NIA TUTMONDA FAMILIO.

..... T.J.O. estas valorega ilo por la venontaj jaroj, ĉar ĝi povos doni al la nuna generacio la ĝustan perspektivon por la estonta kreado de frateco kaj justeco inter la homoj. Do, ni ne devas agi tro rapide, sed pripensi ĉiun antaŭenpaŝon. Ni konstruu unu fortan fundamenton, kaj poste iom post iom ni aldonu ĉiun fortan brikon!

John Holland

(nuna adr: Puddingmoor, Beccles, Suffolk, Angl).

27-12-'45.

..... Miaj multaj nederlandaj geamikoj informis min pri la teruraj tempoj de la okupado. Ni en Anglujo ne spertis tiel terurajn tempojn de malsato, ktp., kvankam la bombardadoj kaŭzis egajn suferadojn. Sed — tiuj tempoj nun estas for — ni povas labori por la estonteco, ke ĝi estu pli bona por la junularo. Ni devas provi edukadi la junularon kaj helpi ilin efektiviĝi la celojn de TJO kaj la Tutmonda Familio.

..... Nun venas denove la tagoj de la Kristnask-festoj — la tempo, kiam ni pensas pri niaj geamikoj kaj diras vortojn pri paco kaj amo. Vortojn, vortojn, ofte nur vortojn. Tio ne sufiĉas. Certe estas, ke post tiuj ĉi teruraj jaroj de la milito ĉiuj **deziras** ke la paco kaj amo regu la mondon. Sed — kiom multaj el ni agas sufiĉe kaj sindoneme por certigi tiujn? Ne multaj, mi timas. Ni estas kiel ŝafoj pelataj tien kaj reen, kiam la potenculoj direktas. Nur se niaj agoj kaj voĉoj estas sufiĉe laŭtaj kaj same potencaj, ni povas konvinki kaj persvadi aliajn — eĉ la registarojn — al kunagadoj.

Mi ja estas tute konvinkita ke estas ege necese por la junularo de la eŭropaj landoj renkontiĝi unu la alian kaj interparoli en fratigaj cirkonstancoj. Kiam mi estis juna knabo mi tute ne povis kredi, ke la ali-landuloj povas esti taŭgaj homoj por renkonti min. Mi eĉ ne kredis, ke ili povas esti homoj same kiel la angloj! Mi tiam loĝis en malgranda vilaĝo kaj, kompreneble, sur insulo — do vi povas iomete kompreni kial la angloj ŝajnas (nur ŝajnas mi esperas!) esti tiel superaj kaj sen amikemaj sentoj.

L. Symes. (Angl)

..... Nun mi esperas ke vi ree starigas TJO. Ankaŭ mi komprenas tre bone ke estas tre malfacila tempo por la movado. Iom

da helpo en mono estas pli bona ol belaj vortoj, sed belaj vortoj kostas malmulte, do oni donas multajn vortojn kaj malmultan helpon. — Tia estas la homo, tia estas mi. Se mi estus riĉa Usonano, mi donacus 100 dolarojn. Jes, jes, tio estus multa — sed mi ne estas tio. Mi donas nur la duonon de kio mi povus doni, mi ne povas doni pli, ĉar mi estas duona esperantisto kaj duona egoisto — tia estas mi. La duono estas f 20 tion mi sendas samtempe per la ĝiro. Estas malmulte. Estas feliĉe, ke vi per malmulto povas fari multon! Sed mi vidas ankoraŭ lumpunkton por vi sur la ĉielo: se aliaj personoj ankaŭ iom donos fariĝos pli ol io!

Mia intenco estas legi „La Juno Vivo”, hodiaŭ kaj en la estonto, mi ne malfideliĝos al ĝi, ĉar mi jam legis ĝin ekde la komenco!

Talpo (Ned.)

KIU ESTAS LA MASINISTO?

Ce vagonaro deĵoras tri viroj, maŝinisto, hejtisto kaj bremsisto, kies nomoj estas: Tomson, Karlson kaj Adamson. La sinsekvo de la nomoj estas alia ol tiu de la funkcioj. En la vagonaro sidas tri komercistoj, kies nomoj estas: s.ro Tomson, s.ro Karlson kaj s.ro Adamson. S.ro Karlson loĝas en Londono. La bremsisto loĝas en Oksfordo. La ĵarsalajro de s.ro Adamson estas £ 200.

Tomson pli bone bilardludas ol la hejtisto. Unu el la komercistoj loĝas apud la bremsisto, kies ĵarsalajro estas £ 100 kaj la komercisto perlaboras la trioblon de tiu sumo. La komercisto, kiu havas la saman nomon kiel la bremsisto, loĝas en Bristol.

Kiu estas la maŝinisto?

(Ĉu vi scias tion? Sendu vian opinion al la TJO-Centro en W. Graafthdijk, aldonante la metodon laŭ kiu vi ĝin trovis. Ni lotumos ĵarkolekton inter la solvintoj).

ALVOKO AL ĴURNALISTOJ KAJ REDAKTOROJ-ESPERANTISTOJ.

Ĉiu esperantisto, laboranta en ĵurnalista fako donu sian adreson por ke ni publikigu adresaron de esperantistaj ĵurnalistoj. Sciigu vian adreson, por ke ni publikigu adresaron de esperantistaj ĵurnalistoj. Sciigu pri via aĝo kaj pri la gazetoj en kiuj vi laboras, la tendencon de la gazeto: politika, sindikata, ekonomia, ktp. kaj pri la temoj, kiuj vin interesas, ĉu vi interŝanĝas librojn, gazetojn, poŝtmarkojn, aŭ ion alian.

Ni ankaŭ volonte akceptos proponojn diversajn pri kunlaboraj metodoj, eventuale pri Internacia Ĵurnalista Societo. Skribu al la iniciantoj: red. Einar Adamson, Göteborg, Svedujo, aŭ red. N. Kavenius, Skolgatan 18, Turku, Finnlando.

KRUC-ENIGMO.

x
x x x
x x x x x
x x x x x x x
x x x x x x x x
x x x x x x x
x x x
x

En la mezo venas, horizontale kaj vertikale, la nomo de iu kamelsimila besto.

Cetere sur la horizontalaj linioj:

1. konsonanto. 2. Multvalora flava metalo. 3. La malo de ridi. 4. Granda publika festo. 5. Stearina aŭ vaksa lumigilo. 6. Teatra verko (tragedio). 7. Moviĝi de iu al alia loko. 8. Vokalo.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos libron. Solvojn ni akceptos ĝis 1 majo (sendu al TJO-centro, West-Graafdiijk, Nederlando).

La solvo de la kombilo-enigmo en la dec.-jan. No estis:

„Tutmonda Junular-Organizo” (tablo, talpo, onklo, dento, junio (julio), nokto, leono, rublo, raŭpo, abelo, ibiso, okulo). La premion gajnis F.ino Gunstra en Leeuwarden (Ned). Ĉar evenvenis tiom multe da solvoj, ni aldonis konsolpremion, kiun gajnis f.ino Mary Bailey en Morley, Cheshire (Anglujo).

PACIENTO.

Korektu la erarojn: Du feturigistoj renkontas unu la alian tsje mallarga ponteto. Neniu al ili desiras flankeniri, do ambou haltas. Unu el ili gviete prenas journalon el la poŝo kaj komencas leki. Tio tamen tute ne senpaciencigas la alian. Goje li krias: „Tuj kiam fi estas preta, bonvolu transdoni ĝin al min!”

(Inter tiuj, kiuj plene korektis la ekzercon ni lotumos kantaron.)

EGOISTO.

Kampano en vilaĝo
Ricevinte la gazeton,
Ekmeditis pri lim-aĝo
Kaj atentis la budĝeton.

Limojn ni detruu devas
Li de Zamenhof jam lernis.
Kaj dum li pri tio revas
Monbiletojn li eksternis.

Certe li donaci povis
Kvar biletojn dek-guldenajn,
Kaj l'idealisto ŝovis
Flanken sumojn la konvenajn.

Sed, ĉar krom idealisto
Ankaŭ egoist' li estis,
Sendis li du al kasisto,
l'Aliaj du en poŝo restis.

Kampano tiel agis,
Kontentigi ĉiujn penis:
La idealisto pagis
Kaj la egoisto tenis.

Ni imitu kampanon
Sin nomanta egoisto.
Tiel ni plenigas manon
De la T.J.O.-kasisto.

ONKLO PIT.

Nia trezorejo: C. W. en R.: f 1; W. B. en R.: f 4; N. N.: f 10; K. N. en S. f 5; K. A. en A.: f 2; S.ino M. en N. Y. (Usono): 4 dol.

TJO-RUBRIKO.

Belgujo (Ĉefperanto C. Braet, *Esscheboomstr. 1, Brugge*): La belga sekcio decidis repreni sian decidon pri la fikso de aĝolimo, kaj lasis tiun aferon por la venonta jarkunveno, por ke ni povu fari ĝeneralan regulon por ĉiuj landoj.

Britujo (Ĉefperantino F.ino N. Rees, *Derwydd, Seven Sisters, Neath, Glam.*): 50 lernantinoj en Tinkers Farm Lernejo en Birmingham aliĝis al TJO. Same grupoj en Kings Lynn kaj en Colchester.

Francujo (Ĉefperantino S.ino M. Turin—*Montagnon, Trepot, Doubs*): Mi nuntempe propagandas por TJO inter la junular-gastejoj. Mi petis aperigon de artikoleto en la J. G.-organo. — Ankaŭ en la gazeto de G. E. E. (Grupo de Esp.-Edukistoj) mi intentas aperigi artikoleton.

Nederlando (Ĉefperanto H. Uittenbogaard, *Koekkoekstr. 22, Hilversum*): Laŭ interkonsento kun la estraro de A.N.J.V. (Ĝenerala Nederlanda Junular-Ligo) la ned. sekcio de TJO prizorgos ĉiujn Esperanto-kursojn por la Junular-Popol-Universitato de tiu ligo, kiu en la aŭtuno de 1946a grand-skale komencos sian laboron kun subteno de la ned. registaro.

La ned. sekcio de TJO aranĝos en la proksima somero tutsemajnan kunvenon en la tendejo „Kampoord”, Soesterberg, por la geanoj, kiuj ne povos ĉeesti la internacian junularkunvenon. La ned. TJO-anoj ricevos cirkuleron, en kiu ili trovos ĉiujn detalojn.

Dum pasko okazos 2-taga TJO-kunveno en Hilversum. Dum tiuj tagoj ni i.a. vizitos la „AVRO-studio”, por kio ni jam ricevis la permeson.

Svedujo (Ĉefperanto K. E. Karlsson, *Upplandsgatan 69, Stockholm*): En la sveda gazeto „Svenska Esperanto-Tidningen, La Espero”, aperis bonega artikolo pri nia organizo, en kiu oni direktas varman peton al la sveda esperantistaro, subteni la junularlaboron. — Geamikoj en aliaj landoj! Ankaŭ vi sendu regule artikolojn pri nia laboro al la esp. kaj nacia gazetaro de via lando!

Svisujo (Ĉefperanto Eugen Klee, *Brasselmühle, Rheineck*): Karaj svisaj anoj, mi estas ankoraŭ „ido” en la esp.-rondo, tial mi ne estas fama, kaj mi mem ne konas multajn esperantistojn. Gesamlandanoj, mi petas vin: Helpu min en la nova laboro, donu al mi adresojn de konataj amikoj. Pagante vian kotizon bonvolu aldoni ĉu vi estas TJO-ano aŭ nur abonanto je „La Juna Vivo”. Ĉi tie la kotizoj estas: por membro aspiranta (ĝis 14-j.): 3.20 fr; membro aktiva: 4 fr; membro subtenanta (plenaĝula): 4 fr; nura abono je LJV: 2,50 fr. (bonv. aldoni, kia membro vi estas). Ne forgesu: „Varbul Varbu, por ke la verda afero vivu!”
(Eugen Klee).

Kelkaj petoj: La sekretario de TJO (Owenstr. 59, Leerdam, Ned) petas la ĉefperantojn, ke ili ĉiam sendu al li 3 ekz. de siaj TJO-Bultenoj, por la arkivo kaj cirkuligo.

Pagante vian kotizon, aŭ sendante novajn anojn, bonvolu ĉiam aldoni la aĝon (aŭ, se temas pri plenaĝaj anoj: membro-subtenanta), por ke ni havu superrigardon.

Oni ĉiam zorgu, ke manuskriptoj por „La Juna Vivo” estu en la redaktejo antaŭ la unua de ĉiu monato.

LA INTERŜANĜADO DE HOLANDAJ KAJ DANAJ INFANOJ.

Finfine ni povas komuniki al vi kelkajn novaĵojn pri la interŝanĝado. Jam por la januara No mi sendis mallongan artikoleon, sed tiam ne estis spaco.

S.ro Grönborg en Danlando retiris sin el la organizado. Ni nun ricevis leteron de s.ro Nielsen en Fredericia. La Centra Dana Esperantista Ligo elektis lin kiel gvidanton de Turista Komisiono. Li jam pli frue organizis karavanon eksterlanden, do la afero en Danlando estas en bonordo. Li certigis al ni, ke li facile povos akcepti tutan aŭtobuson da gejunuloj nederlandaj kaj ankaŭ ke li povos sendi plenan aŭtobuson da geknaboj danaj al Holando.

En „Commentaar” (la gazeto de la registar-klarigoservo) ni legis, ke organizi eksterlandajn vojaĝojn estos malfacile, sed eble. Tio nur povos okazi, se kontraŭ ĉiu holanda grupo, kiu iras al Danlando, sama dana grupo venos al Holando. Tial necesas, ke ni kiel eble plej baldaŭ sciu kiom da infanoj partoprenos al la interŝanĝado. Tiam ni plue povos aranĝi kaj organizi la aferon. Do, geknaboj anoncu vin tuj, kaj skribu ankaŭ al ni, kiom da geknaboj danaj vi en via grupo povos gastigi. Jam anoncis sin tri grupoj, kiuj volas fari tion: En Enschede, Koedijk kaj West-Graafdyk. La lastaj grupoj estas tre entuziasmaj, kaj jam volas formi ŝparkasojn por pagi la kostojn. Ni ne precize scias, kiom altaj estos la vojaĝkostoj. Ni taksas, ke ili estos proksimume f 25. Sed ne ankoraŭ estas certe.

Por informoj, komunikaĵoj ktp. skribu rekte al S.ro W. Bant, Wage-makersweg A 154, Groet (NH), ĉar li kaj s.ro Schut prizorgos la aferon en Ned. Do bone notu la adreson.

W. B.

INTERNACIA JUNULARKUNVENO DE TJO.

Somero 1946a. La internacia Junularkunveno okazos en *Blankenberge*, Belgujo, en la fino de julio aŭ komenco de aŭgusto. Ni jam havas certecon ke ni povos uzi la junulargastejon, kiu apartenas al la Instruista Instituto; plej verŝajne ni povos uzi ankaŭ la instruistan lernejon mem.

Detaloj sekvos kiel eble plej baldaŭ; sed jam nun anoncu vin ĉe *Floor Meydam, Owenstr. 59, Leerdam (Ned)*.

La programo enhavas: vizitoj al la marbordo, festvesperoj, laborkunsidoj, prelegoj, ekskursoj, liberaj promenadoj, ktp., ktp! Skribu al la sekretario se vi kunlaboros en la programoj (prelegoj, teatraĵoj, kantado, muzikado, deklamado, dancado, ktp.), kaj ĉu vi povos kunpreni propran tendon. — Frutempe zorgu pri la landlimaj formalajoj! — Interrilatu kun la landaj ĉefperantoj pri komunaj aranĝoj je tio.

Alvoko: Internacia Grafika Esperanto-Ligo (IGEL) denove estas rekonstruita post la milito. Ĉiujn tutmondajn grafikajn esperantistojn ni vokas al komuna laboro. La jarkotizon vi povas sendi (5 int. respondkuponoj) al IGEL, poŝtkesto 12, Ulsvunda 1, Svedujo.

VIZITO AL INTERNACIA KUNVENO.

Antaŭ nelonge oni sendis min, soldato en la Brita Armeo, al Londono, kie mi nun laboras en oficejo. Dum mia Londona loĝado mi jam vizitis la Britan Parlamenton kaj nombron da mondfamaj konstruaĵoj. Sed estis por mi neforgeseble ĉeesti unu el la ĝeneralajn kunvenojn de la Nacioj Unuigitaj en la Central Hall, Westminster.

Iom post iom la delegitoj envenis kaj prenis siajn seĝojn. Bedaŭrinde tiuj el Britujo, Usono kaj Sovjet-Unio estis nevideblaj por mi, ĉar ili sidis sub la publika galerio. Tamen estis interese rigardi la aliajn, la solan Etiopanon, la dek Cinojn, la europajn kaj sud-amerikajn delegitojn. Je la posttagmezo, kiam mi estis tie, prezentis siajn raportojn al la ĝenerala Kunveno la individuaj membroj de la „Komitato por la Bonestado de Koloniaj Popoloj”. Post la prelego de la prezidanto de tiu komitato (mi kredas nederlandano), parolis la aliaj komitatanoj. Unue ni aŭdis la usonan delegiton, sekvata de la konata Ĉino, D.ro Wellington Koo, kiu bonege parolis angle. Tiam venis la delegito de Egiptujo, francparolanta sinjoro, kaj post li Kubano, maldika grizharulo, kiu tre malfacile parolis angle. Poste venis la brita kaj perua delegitoj, sed tiam estis tempo por mia foriro, do mi forlasis la kunvenejon.

Ho, amikoj, kiom pli facila kaj interesa estus tia kunveno, se oni nur parolus Esperanton! Ĉe Central Hall estis du oficialaj lingvoj, la franca kaj la angla. Post ĉiu parolado venis al la parolejo senhara, okulvitra sinjoro, kiu tradukis la prelegon en la alian oficialan lingvon. Oni tradukis eĉ la vortojn de la Kunvena Prezidanto, S.ro Spaak el Belgujo.

Per la uzo de Esperanto la Nacioj Unuigitaj farus sian laboron en la duono de la tempo, aŭ, kontraŭe, farus duoblan laboron en egala tempospaco. Jen, kamaradoj, kiom la diverslingveco malhelpas la pacon kaj la progreson de la popoloj.

R. H. O. (Londono, Britujo).

GRAVA ALVOKO.

Neniam antaŭe la popoloj de la mondo tiom interesiĝis pri internacia kunagado, nunmomente kulminanta en la malfermaj kunsidoj de la organizaĵo de la Unuigitaj Nacioj. Neniam antaŭe la Esperantistoj montris sin tiel pretaj labori por la movado, kaj neniam antaŭe ekzistis tia bonega tereno tiel preta por la plugado!

Ni devas ne preterlasi tiun unikan okazon. Sekve la Estraro de IEL aprobis projekton per kiu vi povos helpi kaj vin kaj nin laŭ tre simpla maniero. IEL organizas tutmondan alvokon al la Unuigitaj Nacioj, kaj via tre aktiva kunlaboro estas nepre necesa por sukcesigi ĝin kaj vere meti Esperanton antaŭ la popolojn de la mondo.

La alvoko estas en la formo de petskribo, kaj ni esperas ricevi ne nur la subskribojn de ĉiuj Esperantistoj, en ĉiuj landoj, sed ankaŭ, pere de ili, la subskribojn de la milionoj da personoj kiuj subtenas la ideon de Esperanto sed mem ankoraŭ ne lernis ĝin.

Se ni sukcesos kolekti amasegon da plenigitaj formuloj de ĉiuj anguloj de la mondo, certe la afero estos utila ne nur rilate al la Unuigitaj Nacioj,

sed ankaŭ por aliaj celoj, ekzemple, ĉe radio-stacioj, ĵurnaloj, ktp. Krome, la provo rikolti subskribon de iu donos al la provanto bonan okazon paroli pri Esperanto; ĝi estas kvazaŭ enkondukilo.

Estas nia espero en ĉi tiu afero ricevi la subtenon de ĉiuj Esperantistaj organizaĵoj, ĉu neŭtralaj, ĉu fakaj. Por la unua fojo en la historio de nia lingvo ni organizas grandskalan tutmondan propagandan penon. La sukceso de la klopodo estas en viaj manoj. Subtenu nian petskribon kaj havigu la aktivan helpon de ĉiuj viaj membroj.

C. C. GOLDSMITH, sekr. IEL.

La TJO-anoj, kiuj ne ricevis de TJO formulojn por la kolektado de subskriboj, senprokraste petu ilin de la landaj Esperanto-asocioj!

TJO-anoj sendu la plenigitajn formulojn al la TJO-Centro.

F. M.

Agu tuj: tiel vi atingos bonan rikolton!

RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

Londonanidoj. Eld. The Esp. Publishing Co, Ltd., Heronagate, Rickmansworth, Anglujo. Prezo: broŝ: 2 ŝ. 6p. afr. 2p. (afrankite guld. 1,43). En 1939, en la komenco de la milito oni sendis milojn da infanoj el la grandaj britaj urboj al la kamparaj partoj. Unu el ili estis Donald Munns, la verkinto de „Londonanidoj”. Mirinde estas, ke la verkinto estis nur 14-jara, sed pli mirinde estas, ke li verkis la libron rekte en Esperanto, kiun lingvon li estis studinta hejme dum 15 monatoj. Bedaŭrinde la aŭtoro mortis en dekkvinjara aĝo. — Ni opinias, ke ĉiuaĝaj legantoj interesos sin pri la spertoj de la urbaj infanoj.

„**Internacia Kulturo.** Monata, grandformata, luksa, riĉe ilustrita 16-paĝa gazeto, eld. de Bulgara Esperanto-Asocio. — Jarabono 30 respondkuponoj. Adr: „Int. Kulturo”, str. Gr. Ignatiev 2, Sofia.

Celo de la revuo estas diskonigi la kulturan, socian kaj ekonomian vivon de la balkanaj popoloj kaj organizi amasan internacian korespondadon. En ĝiaj paĝoj estas senpage publikigataj adresoj de korespondemuloj.

Mendebla ĉe TJO-Centro. Jarabono f 4.

„**Avo Joco rigardas**”, verkita de Ivan Vazof, trad. de Kr. Georgiev. Rakonto pri la vivo de la bulgara popolo dum la unuaj jaroj post la liberigo de la kvincentjara turka jugo. La ilustrita libreto estas akirebla kontraŭ 3 respondkuponoj ĉe: Bulgara Esp. Asocio, Str. Gr. Ignatiev 2, Sofia, Bulgarujo. Mendebla ankaŭ ĉe TJO-Centro. Prezo f 0,40.

Anekdoto.

„Kaj la nomo estos” demandis la pastro, ĉe la bapto-servo.

Aŭgusto Arĉibaldo Cesterfildo Fernando Livingŝtono Bart-Jones,” venis la respondo.

„Ho vel!” diris la pastro, kaj turnis sin al la servisto de la preĝejo, „pli da akvo, mi petas.”

F. TAYLOR (Halifax, Angl.).

KORESPONDADRESOJ.

Argentino: Fino Susa Cursach, Entre Rios 919, Buenos Aires, 9-jara studentino, dez. kor. Satas legi belajn librojn.

Bulgarujo: La membroj kaj la kursanoj ĉe Unua Bulgara Gejunula Societo „Ilja Erenburg” dez. kor. pri ĉiuj temoj kun ĉiuj landoj. Adr: Sterjo Z. Kukuŝev, str. „Mihail” 114, Peŝtera.

Cuba: 20-j. studento en legoscienco ĉe Universitato en Havano dez. seriozajn gekorespondantojn en Eŭropo. Edm. Morilla, Gervasio 107, La Havane.

Franco: S.ro Ernest Foulou, à Trémons Lot & Gne, Garonne, 20-j. fraŭlo, fariĝos instruisto, dez. kor. kun gejunuloj.

„La Kunuloj” el la Infanrespubliko de Bosuci (kastelo apud Parizo) dez. kor. Ili estas 8-10-15 jaraĵoj, kaj eĉ eldonas gazeton. Prefere kor. grupe. Adr: Al la Kunuloj de La Bastide de Beaux-Soucis, par Brevillet, Seine-et-Oise.

S.ron F. Depreux, 8, Rue Pargaminieres, Toulouse (HG), dez. interŝ. poŝtmarkojn, kvanton kontraŭ kvanto (25-25, 50-50). Kor. pri ĉiuj temoj.

Hispanujo: Ramón Molera, Str. Hospital 13, Moyá (Barcelona), dez. kor. precipe kun anglaj, francaj belgaj gesamideanoj.

Nederlando: S.ro Chr. Wierkx, p/a P. Verboom, 's Gravenzandestr. 8, Schiedam, serĉ. kor. kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. Certe respondos.

S.ro H. Oortwijn (17-jara), Kormmeniedijk 168, Krommenie, dez. kor. kun gekamaradoj en aliaj landoj. Interŝ. poŝtmarkojn, fotografaĵojn, ktp.

S.ro Jan Leguít (20-jara), Krommeniedijk 60, Krommenie, dez. kor. kun kamaradinoj en aliaj landoj.

Miaj kursanoj volonte volas korespondi kun eksterlandanoj! Estas f.inoj de 16-24-jaraĵoj, kaj s.roj 17-37-j. Sendu viajn kartojn al mi. Mi transdonos ilin. H. J. Schut, lernejestro, Heerhugowaard.

Portugalujo: (korekto): João Frazão de Faria (16-jara) serĉas pr. samaĝan kor. inon en Nederlando, kiu sufiĉe bone scipovas Esp. kaj interesiĝas pri la interŝ. de Esp. libroj. Adr: R. José Estêvão 26-3° E.

Svisujo: S.ro Angelo Bobbia, Nidaugasse 8, Biel Kt., Bern, 20-jara, studas ĉe komerca lernejo, deziras korespondi.

Svedujo: S.ro Olle Aberg, Karl Johans gata 16, Skövde, dez. interŝ. poŝtmarkojn kun junaj filatelistoj.

La gesinjoroj Aŭg. Weide anoncas, ke ili denove loĝas en Ringköbing, Danujo. Ili fartas bone kaj havas dujaran filineton, kiu jam nun same bone parolas siajn malmultajn vortojn kaj dane kaj esperante.

Ĉiam malkontenta!

Viro iris preter la ĝardeno de vilaĝano. La edzino de la vilaĝano ĵus elfosis terpomojn. La viro vidis, ke ĉiuj terpomoj estas grandaj. Li diris „Vi rikoltis tre belajn terpomojn. Kiom grandaj ili estas!”

„Jes, vi pravas,” respondis la ĉiam malkontenta virino, „sed al mi ne utilas nur grandaj terpomoj, ĉar nun mi ja ne havas sufiĉe da malgrandaj por la porkoj!”

PERANTOJ.

	TJO	LJV
Belgujo: C. Braet, Esscheboomstr. 1, Brugge, ĝiro 4770.86	40 fr.	24 fr.
Britujo: F.ino Rees, „Derwydd”, Seven Sisters, Neath, Glam. Wales	5 ŝil.	\$ 3
Bulgarujo: Sterjo Z. Kukuŝev, Str. Michael 14, Peŝtera	125 lev.	75 lev.
Danujo: C. Jensen, Musikhuset, Nyköbing, F.	5 kr.	3 kr.
Finnlando: Svante Kivinen, Vipurinlääni, Kouvola ...	125 fmk.	75 fmk.
Francojo: S.ino Turin, Instruistino, Trépot, Doubs. Ĝironumero 287.02, Dijon.	100 fr.	60 fr.
Hispanujo: Octavio de Diego la Rosa, Baltazar Gracián 12-3°, Zaragoza	12 pes.	7 pes.
Italujo: Prof. Camuffo Armando, v. Bartolomeo, d'Alviano 4 IV, Trieste	5 \$	3 \$
Maroko: S.ino I. Fink, 5 rue de Savorgnan de Brazz, Casablanca	100 fr.	60 fr.
Nederlando: TJO-Centro, West-Grafdijk, ĝiro 382363	f 2,50	f 1,50
Portugalujo: A. P. da Silva, Quinta do Ferro, Rua B. No. 28—20 Dto, Lisbono	25 esk.	15 esk.
Norvegujo: Norv. Esp. Ligo, Box 942, Oslo	5 kr.	3 kr.
Svedujo: K. E. Karlsson, Upplandsgatan 69 ^a , Stockholm, ĝironumero 252674	4 kr.	2½ kr.
Svisujo: Eugen Kleen, Brasselmühle, Rheineck ...	4 fr.	2½ fr.

BINDITAJ JARKOLEKTOJ de „La Juna Vivo” enhavas abundon da legaĵo por komencantoj kaj progresintoj, ŝercojn, ludojn, enigmojn, kantojn, ktp. La belaspektaj libroj estas valorplena posedaĵo por ĉiu esperantisto! Tre taŭgaj helpiloj en kurs- kaj grupvesperoj! Atentu, ke estas haveblaj binditaj kolektoj nur de la 1-a, 2-a kaj 3-a jaroj. Prezo po f1.— (3 \$.)

INTERNACIA KANTARO „La Juna Vivo”. La prin-tempo estas kanto-tempo, do la tempo por mendi nian kantaron! Enhavo: 34 kantoj kun muziknotoj. Prezo: f 0,50 (1 \$).

RADIO-RUBRIKO.

Oni planas starigon de intereŭropa radio-staciario. La projekto antaŭvidas reton de 38 stacioj, dismetitaj tra la tuta Eŭropo kaj disponantaj pri 11 ondolongecoj. La longaj ondoj estu rezervitaj ekskluzive por tiu eŭropa servo. Por solvi la lingvajn problemojn oni provos fari dissendon en diversaj lingvoj. Oni ankaŭ studos la eblecon uzi Basic English aŭ artefaritan lingvon. — Do, Esperantistoj, prenu viajn plumojn kaj simplan poŝtkarton kaj skribu esperantlingve al: President of International Radio Maritime Committee, British Broadcasting Corporation, London, ke vi en la estonta reto deziras esperantan dissendon por ke vi kiel en 1938 povu ĉiutage aŭskulti esp.-programon en via radioaparato.

Ĉu vi vizitos la TJO-kunvenon en Hilversum, je Pasko?

Jam nun anoncu vin ĉe Henk Uittenbogaard, Koekkoekstr. 22, Hilversum.